

Stefano KELLER (konciza biografio)



Aktiva esperantisto ekde la 1970-aj jaroj, Stefano Keller akiris diplomojn pri instruado kaj psikopedagogio en universitatoj de Budapeŝto. Li daŭrigis siajn studojn pri kaj profesie aktivis en la fakoj edukado, psikanalizo, genetiko/medicino (membris en Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo; en la 80-aj jaroj li estis sekretario de UMEA). Krom la internacia li parolas la anglan, la francan, la germanan kaj la hungaran lingvojn, baznivele la hindian, sinhalan. Vivas en Svislando.

Inter 1984 kaj 1986, Stefano Keller aktivis plentempe kiel esperanto-instruisto kaj metodologo, kunlabore kun Claude Gacond, en La Chaux-de-Fonds, ĉe Kultura Centro Esperantista. Li estis unu el la kunfondantoj de Junularo Esperantista Svislanda kaj estas daŭra kunlaboranto de la planlingva arkivejo, CDELI (La Chaux-de-Fonds). Diplomito de Internacia Esperanto-Instituto pri Esperanto-instruado laŭ la Cseh-metodo, li organizis prelegojn kaj instruis Esperanton en universitatoj kaj en la laborministerio de Srilanko.

Li studadis etnologion, antropologion aŭtodidakte kaj vizitis plurajn regionojn de Ameriko, Azio kaj Eŭropo, kelkfoje kiel delegito de la NRO-j: Terre des Hommes kaj Svisa Ruĝa Kruco. Li aktivis (aŭ ankoraŭ aktivas) en diversaj organizoj (Societo por minacataj popoloj, Sentinelles kaj aliaj). Fine de la 90-aj jaroj li kreis la projekton Esperanto en Maŭricio: li tradukis kantojn de maŭriciaj artistoj el la kreola lingvo en Esperanton (Mary-Jane Gaspard: 'Nur Amiko', Negro Pou la Vi: 'La Persisto'). Lia etno-muzika produktado listigas ankaŭ la kanton 'Granda Festo' el Madagaskaro, de la Grupo Ligilo (Trait d'Union). El tiu agado rezultis pozitivaj eĥoj pri Esperanto, en kaj ekster la insularo de la Hinda Oceano.

Ekde 2006 li estas sekretario de Svisa Esperanto-Societo (SES), kies bultenon li kunredaktas. En septembro 2006, li organizis la partoprenon de SES en unu el la plej grandaj ekspozicioj en Svislando: Comptoir Suisse, kie – kun aliaj aktivuloj – li prelegis kaj alparolis en diskutrondoj.

Tre aktiva en la kampo de la agado por lingvaj rajtoj, li regule kunlaboras kun mondfamaj lingvistoj, kiel Tove Skutnabb-Kangas kaj Robert Phillipson, membras en la Minoritata Esplorreto (Minority Research Network, Erasmus School of Law, Rotterdam). Li estis unu el la ĉeforganizantoj de la Simpozio de UEA pri Lingvaj Rajtoj ĉe UN en Ĝenevo (24.04.2008), kaj ekde tiam li pluaktivis en diversaj kunsidoj de UN. Ekde januaro 2009 Stefano Keller estas ĉefrepresentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo.

Motivoj de kandidatigo kiel estrarano de UEA:

Deziras kontribui al la laboro de la Estraro, ofertante sian laborforton, utiligante siajn spertojn de plurjara kaj multflanka aktiveco en la movado kaj ekster ĝi, akiritaj en kontakto kun diversaj kulturoj, instancoj, organizoj.

Deklaro de movadaj kaj poroficaj celoj:

- *Ĝenerale*: atingi tion, ke UEA iĝu la pli kaj pli laŭta kaj respektata voĉo de etnaj, lingvaj minoritatoj. Defendi la lingvaj rajtojn per la disvastigo de Esperanto kaj per efika agado kadre de internaciaj organizoj kiel UN.

- *Laŭofice*: esplori kaj analizi la aktualajn situacion kaj eblojn de interagoj kun la ekstera mondo, trovi, difini novajn okazojn, agadmanierojn kaj strategiojn efikajn cele al planado kaj efektivigo de konkretaj paŝoj. Agadi profesie kaj prilabori la plej ĝustan vojon al kreskigo de la prestiĝo de UEA kaj de Esperanto ĝenerale antaŭ aliaj NRO-j, same kiel antaŭ la ĝenerala publiko. Aktivuloj akiru influajn rolojn, postenojn en similorientitaj NRO-j, ĉefe ene de la organizo CONGO (la konferenco de NRO-j en konsulta rilato kun UN).